

ENHAVO:

1. Euxropa Esperanto-Kongreso en Esperanto-Urbo
 2. La plej proksima programo en Esperanto-Muzeo Svitavy
 3. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (oficiala rubriko de CxEJ)
 4. Kalendaro de Esperanto-arangxoj en Cxehxio aux organizitaj el Cxehxio
- !!!ATENTU!!! Internacia Kultura festivalo en Ústí NULIGITA !!!

1. LA 8-A ESPERANTO-KONGRESO EN ESPERANTO-URBO

La 8-a Euxropa Esperanto-Kongreso okazos kune kun la 86-a Germana Esperanto-Kongreso de la 28-a de majo gxis la 3-a de junio 2009 en la oficiala Esperanto-urbo (Esperantostadt) Herzberg am Harz (okcidente de Leipzig), do ne tro for de la cxehxa limo. Temas pri la dua grava Esperanto-evento (krom Universala Kongreso en pola Bjalytostok) kiu okazos en najbara lando. Se ni alkalkulas Internacian Junularan Kongreson en la cxehxa urbo Liberec, estos venontjare vere cxuij plej gravaj kongresoj en la meza Euxropo, do por ni bone atingeblaj.

La cxeftemo de la kongreso estas "Esperanto por multkultura Euxropo". Dum la kongreso okazos ankaux Euxropa Konferenco organizata de Euxropa Esperanto-Unio sub la temo "Signifo de la falo de Berlina muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo".

Atentu, ke ekde la 1-a de decembro altigxas la kotizoj por EEU kongreso, do ke vi eksci pri gxi gxustatempe por povi gxui la plej favoran kongreskotizon.

La konkretaj kotizoj por Cxehxaj esperantistoj (gxis la fino de novembro) estas 40 EUR (ekde 1.12.: 55 EUR), junuloj (naskitaj gxis 1981) 30 EUR.

La komitato de CxEA decidigxis, por faciligi la pagojn de interesatoj, ke oni povu pagi per CZK al la konto de CxEA 195230825/0300, kiel varian simbolon (variabilní symbol) bv uzi 06945. Via pago devas atingi la konton de CxEA plej malfrue la 28-an de novembro! La kotizo en CZK ene de tiu unua periodo estas 1050.- Kč, junuloj 800.- Kč, ekde la 1-a de decembro 1450.- Kč. Plej sekure rilate al la tempo estas pagi rekte en posxtofico cxe la gicxeto Posxta sxparkaso (poštovní spořitelna). Post la pago bv. tuj informi Vratislavon Hirš <hirs@gm.vyskov.cz>, kiu respondos ankaux viajn eventualajn demandojn.

Por la aligxintoj estas preparitaj pli ol 300 litoj en Herzberg kaj proksima cxirkauxajxo, ankaux favorprezaj en privataj logxejoj kaj por junuloj en amaslogxejoj, do en diversaj prezkatégorioj. Por ekzemplo, dupersonaj cxambroj jam ekde 15 €/pers. kaj kvarpersonaj ekde 10 €/pers. Estas preparata speciala brosxuro pri logxebloj, kiun ricevos cxuij aligxintoj.

Malgraux tio, ke Herzberg ne estas tro for de nia lando (439 km de Prago), la konekto per publikaj trafikiloj estas iom komplika. Tial la aligxintoj bv. kontakti Vladimír Dvořák (vl.dv@centrum.cz <<mailto:vl.dv@centrum.cz>>), kiu pretas lauxeble kunordigi vojaĝojn per propraj auxtomobiloj. Bv.

indiki al li, cxu vi aligxas kiel sxoforo kun propra auxito aux kiel interesato pri kunvojagxo, de kiu loko kaj tra kie vi veturos, ekde kiam gxis kiam vi partoprenos EEU kaj kiom da lokoj vi bezonas aux disponigas. Sekve li dissendos al cxiuj aligxintoj liston kun informoj kaj retkontaktoj. La vojaĝxkoston oni disdividos inter samauxtanoj. Estas klare, ke estas certa probable, ke la strebo de kunordigo sukcesos nur parte, tial ju pli frue vi anoncos vin, des pli granda estos via sxanco povi uzi tiun eblon malaltigi viajn vojaĝxkoston.

La partoprenantoj, kiuj disponas pri naciaj kostumoj, estas petataj kunporti ilin (kaj flagon) por la organiza festprocesio.

Pli da informoj kaj aligxilojn vi trovos cxe:

<http://gek-EEK.esperanto-urbo.de/>. Se vi volas ekscii pli pri Esperanto-urbo Herzberg kaj gxia Interkultura centro, bv. iri al <http://www.herzberg.de/> aux <http://www.ic-herzberg.de/>.

LA PLEJ PROKSIMA PROGRAMO EN ESPERANTO-MUZEJO SVITAVY

26.11.08: Prelego de Petro Chrdle: Esperanto v kontextu dalších jazyků (Esperanto kunlige kun la ceteraj lingvoj)

6.12.08: Antauxkristnaska tago cxefe (sed ne nur) por infanoj.

7.12.2008: Marcipana Kristnasko kun Anna Vyšínková. Malkasxo de la sekreto de produktado de marcipanaj figuroj kaj aliaj objektoj.

Informoj pri cxiuj pli supraj eventoj: Libuše Dvořáková
dvor.libuse@seznam.cz.

CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) kunvenis de la 25-a gxis la 27-a de oktobro 2008 en Liberec, urbo kie gxi julie de 2009 okazigos la 65-an Internacian Junularan Kongreson de TEJO. La renkontigxon cxeestis 15 esperantistoj, inkluzive de reprezentantoj de TEJO kaj CxEA. Pro sia eksterlanda studo tamen ne partoprenis la prezidanto Marek BLAHUŠ.

Okaze de la renkontigxo kunvenis en Liberec ankaux la 4-a gxenerala asembleo de CxEJ, kiu aprobis jarraporton kaj elektis novan estraron, en konsisto: prezidanto Marek BLAHUŠ, vicprezidanto Daniel MRÁZEK, kasistino Dagmar CHVÁTALOVÁ, ceteraj komitatanoj Miroslav HRUŠKA kaj Barbora ZÁVODSKÁ; membroj de revizia komisiono Tomáš BŘICHÁČEK, Petr Adam DOHNÁLEK kaj Karol RYDLO. La nova estraro dankas al eksestraranoj Aleš TOMEČEK kaj Jan URBÁNEK pro ilia agado.

Dum la asembleo estis pritraktita Propono de kunlaboro inter CxEA kaj CxEJ pri konkretaj projektoj (lingva kaj komputila klerigado, preparo de jubilea DVD, organizado de IJK en Liberec.

Raportajxo pri la renkontigxo en Liberec kaj protokolo de la gxenerala asembleo troveblas en la CxEJ-retpagxaro cxe <http://cej.esperanto.cz/>

Komence de novembro Daniel MRÁZEK partoprenis KAEST en Dobřichovice. Semajnon antaŭe Marek BLAHUŠ cxeestis la renkontigxon PSKK en Belgio.

4. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANGxOJ GXis LA FINO DE LA JARO

28.-30.11.2008: ATENTU!!! Internacia Kultura Festivalo kune kun la 29-a Ĉeĥa-Saksa Tago, Ústí nad Labem ESTAS NULIGITA. BV informi ankaŭ viajn amikojn, kiuj ne estas rete atingeblaj.

6.-7.12.2008: Programo en la Esperanto-muzeo Svitavy - rigardu punkton 2.

13.12.2008: AnkRo - Antauxkristnaska renkontigxo en Písek. Zamenhofa kaj tradicia kristnaska kultura programo. Inf.:
esperanto.pisek@seznam.cz

29.12.2008: La 31-a Internacia Silvestro en Česká Třebová kun ta temo "Kabaredo" Inf.:
zn.esperanto@seznam.cz

En venontaj RET-komunikoj, kiujn ni planas dissendi antaux Krisnasko, aperos kalendaro de Esperanto-arangxoj en Cxehxio kaj organizitaj el Cxehxio en la jaro 2009. Cxu gxi estos kompleta dependos ankaŭ de vi. La informojn pri la arangxoj sendu al la retadreso de la redaktoro chrdle@kava-pech.cz.